# Kluba Bulteno

**Organo de Klubo Esperantista en Oslo**

**N-ro 4 2009 Vendredon la 30an de oktobro 57a jaro**

# Kalendaro

**(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / *Hvor?* – vd. p. 4 / *se s. 4*)**

**Lundon la 2an de novembro** (semajno / *uke* 45 – *mandag*

Ludi kaj lerni. Ni provos kelkajn novajn kaj malnovajn paroligajn ludojn.

*"Mitt skip er lastet med .... " Vi øver oss i esperanto med noen nye og gamle leker og spill.*

**Lundon la 16an de novembro** (semajno / *uke* 47) – *mandag*

Otto Prytz: Pri la jubileulo Louis Braille kaj pri la historio de lia invento, la skribsistemo por blinduloj. Kiel adapti ĝin al aliaj lingvoj, muzik-notoj, matematiko k.a.?

*Otto Prytz: Om Louis Braille (f. 1809) og utviklingen av hans oppfinnelse, blindeskriften. Hvordan kan den til-passes andre språk, og fagspråk som noter, matematikk o.a.?*

**Lundon la 7an de decembro** (semajno / *uke* 50) – *mandag*

Bruno Riefling (1895 – 1918), estis prezidanto de NEL ĝis sia frua morto pro la t.n. hispana gripo. Lia nevino, Monica Lund, prezentos norvege diversajn liajn postlasitajn skribojn.

*Bruno Riefling (1895 – 1918) var for-mann i forbundet da han døde, bare 23 år, i spanskesyken. Hans niese, Monica Lund, presenterer på norsk utdrag fra hans etterlatte papirer.*

**Lundon la 14an de decembro** (semajno / *uke* 51) – *mandag*

Zamenhofa kunveno, la tagon antaŭ lia 150-jara jubileo. Bjørn K. Øyen kaj Douglas Draper prezentos lian projekton de neŭtrala universala bazo de la mondreligioj, kiun li nomis "homaranismo". Kian aktualecon ĝi povas havi por la hodiaŭa mondo?

*Zamenhof-møte, dagen før 150-års-jubileet. Bjørn K. Øyen og Douglas Draper legger fram prosjektet hans for et nøytralt felles grunnlag for verdens religioner, som han kalte* homaranismo. *Hvilken aktualitet kan det ha for dagens verden?*

**Lundon la 4an de januaro** (semajno / uke 1) – **mandag**

2010: Internacia jaro por la proksimigo de kulturoj. Kiujn planojn havas Unesko kaj UEA?

*2010: Internasjonalt år for tilnærming mellom kulturer. Hvilke planer har UNESCO og Verdensforbundet UEA?*

# OKAZIS

**Lundon 7 septembro**

Kjell Peder donis siajn impresojn pri la jubilea Universala Kongreso (UK) en Bialystok, kun gravaj aldonoj de Otto. En la UK oni ofertis pli da kulturaj programoj ol kutime, sed ofte en lokoj tre malproksimaj de la kongresejo. Kvazaŭ kompense oni aranĝis koncertojn malfermajn al la urbanoj, kaj tiel eĉ dancigis ilin. Kaj la gastiganta urbo pli forte subtenis la kongreson ol alijare: i.a. per fordonacado de libroj en la akcepto ĉe la urbestro, kiu ankaŭ paroladis en Esperanto.

KPH / DD

**Lundon 21 septembro**

Ni interparolis nur mallonge pri ebla agado kadre de la Eŭropa Tago de Lingvoj, ĉar inter la ĉeestantoj mankis agemuloj. Poste ni diskutis pri realiĝintaj informiniciatoj, i.a. en la studenta grupo.

**Lundon 5 oktobro**

Douglas kaj Kjell Peder raportis pri la jarkunveno de la esperantokursejo en Lesjöfors, de kie ili ĵus revenis. La svedoj havas problemojn similajn al la niaj – ili posedas domon nesufiĉe uzatan por kovri la konstantajn elspezojn. kaj, kiel ĉe ni, ankaŭ la solvoj dependas de la engaĝiĝo de tre malmultaj homoj. Kaj same kiel ni, ili serĉas luontojn por havigi ***en***spezojn.

**Merkredon 7 oktobro** (kromkunveno)

Nur tri tagojn antaŭe ni sciiĝis pri vizito de Martin Strid, la prezidanto de la estraro de la kursejo en Lesjöfors, kaj multaj membroj ne povis veni. Ili maltrafis demonstron de komputila ludado de popol- kaj alia muziko laû cifereca muziknotosistemo kiun evoluigis Martin mem surbaze de la solfeĝo (do – re – mi – ..). Li donacis al ni kopion de sia kolektego de nordiaj popolaj kantoj – notitaj solfeĝe.

**Lundon 19 oktobro**

Asbjørn Lindh prezentis la judan profeton Hillel – konatan al ni precipe pro la Ora Regulo – kun enrigardo al liaj vivo kaj instruo. Ni rekonis saĝaĵojn kiuj poste aperis en la evangelioj pri Jesuo aŭ en la proverboj de Zamenhof. Poste Asbjørn surtabligis abundan vegetaran manĝon inspiritan de judaj tradicioj**.**

DD

---

## *Har du lagringsplass hjemme?*

*Vi har i kjelleren her boklageret fra Esperantoforlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Hvis noen kunne lagre noe av det hjemme, ville det frigjøre plass som trengs til mer aktuelle ting (f.eks. deler av Forbundets bibliotek, som snart må flyttes fra magasinet i Hamar bibliotek). Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe.*

# Vintra restado en Lesjöfors?

La Esperanto-kursejo en Lesjöfors, en orienta Värmland, anoncis "malferman domon" de sabato la 19a de decembro ĝis dimanĉo la 10a de januaro.

Trankvila **jula semajnfino** merkredo 23 – dimanĉo 27 decembro. Kune oni preparos malluksajn sed tipajn julajn manĝojn – ankaŭ vegetarajn.

**Novjara semajnfino** merkredo 30 decembro – dimanĉo 3 januaro. Bona nokta manĝaĵo por maldormantoj. Televida koncerto. Preĝejo frumatene?

La 2an julan kaj la 2an novjaran tagojn: **diskutoj pri ideoj** por **evoluigo** de la **kursejo**, i.a. nordia kunlaboro.

Kunportu muzikilojn aŭ aliajn amuzilojn.

Vi rajto ankaŭ forkaŝi vin kun bona libro (kiaj troviĝas amase tie, precipe en la subetaĝo).

Nur kovru la rektajn elspezojn – 60 sv. kr. tagnokte, aldone 150 por la jula aŭ la novjara tago. Se nur tiam vi venos, donaco de 100 kr tage bonvenos, alie sufiĉos 50. (100 sv.kr = ĉ 81 norvegaj)

(Vd ankaŭ la sciigon en N*orvega Esperantisto* 5, p.14.)

Bv. kontakti nian oficejon por pliaj detaloj kaj por kunordigi restadon / vojaĝon kun aliaj interesiĝantoj (norvegaj aŭ svedaj).

---------------------

**Veturo:** Oni povas iri ekz-e per Swebus-express Oslo – Karlstad – Filipstad, kaj de tie per loka buso al Lesjöfors, sed malplikoste estas per busoj de *Värmlandstrafik* de Töcksfors al Lesjöfors por 100 svedaj kronoj, aŭ 80 per rabata karto – t.e. nur ĉ 65 norvegaj kronoj. (Tiu prezo validas ĉien ene de Värmland.) Per Swebus la veturo Oslo – Töcksfors kostas 90 – 130 svedajn kronojn, depende de kiom frue oni antaŭmendas. 20% rabato por studentoj kaj ĉiuj < 26 jaroj aŭ > 64.

---

# Fondaĵo Kjell kaj Aase Gustavsen – asigno, limdato

La kluba estraro ricevis petskribon de la Studenta Societo kaj la Norvega Junularo, kiuj kune aranĝas intensan kurson ĉi-semajnfine en Bondehytta en Nittedal. Ni asignis la petitajn 2 900 kr.

La fondaĵo estis starigita en 2004 per donaco de Kjell (1915 – 99) kaj Aase Gustavsen por subvencii junularan aktivadon – precipe vojaĝojn por serĉi inspiron ĉe la movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon el kiu povas profiti la Oslo-kluba junularo.

La estraro fiksis novan **limdaton** por petoj: vendredo 30 aprilo (semajno 17) 2010. Pri urĝaj aferoj eblas petskribi pli frue pri relative malgrandaj sumoj.

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? *Vil noen leie møterom?*

POR KOVRI la plialtiĝintan domluon ni **luigas nian kunven-ĉambron** al eksteruloj. Ni nun havas luontojn por la dimanĉaj kaj kelkaj ĵaŭdaj vesperoj, (kaj foje luigis por sabato) sed ni bonvenigos pliajn. La baza prezo estas 600 kr por vespero, sed eblas marĉandi pri rabatoj.

Ĉu vi scias pri organizo aŭ grupo kiu volus lui por vespero(j)? (aŭ matenoj) Broŝuro kun detalaj informoj kaj bildoj haveblas.

*FOR Å DEKKE den økte husleien prøver vi å få* ***leid ut møterommet*** *vårt til andre organisasjoner. Vi har nå leietakere for søndagskveldene og for én torsdagskveld i måneden, men vi kan gjerne leie ut til flere. Prisen er i utgangspunktet 600 kr for en kveld, men prisen kan det forhandles om.*

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie for en eller flere kvelder? Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.*

---

## Ĉu vi volas aĉeti librojn aŭ insignojn? / – *kjøpe bøker* .. ?

Ekz-e la novan lernolibron de Stano Marĉek *Esperanto – direkte metode* (danan) aŭ la klasikan *Fenomenet Esperanto* (50,-) aŭ insignoj (verda stelo)? Aŭ la kolekton (2009) "Lingvaj paĝoj el *Norvega Esperantisto"*? Ni havas ankaŭ la novan eldonon de la Biblio, kun la apokrifaj libroj, por 202 kr.

Nia klubo ĝenerale ne importas por la vendobretaro, sed povas havigi el eksterlando kelkajn ekz de iu libro se pluraj membroj mendas ĝin.

## Ruĝaj glumarkoj / *Røde klistremerker*

Ni ankoraŭ vendas ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm). Por valizo, dorsosako, teko ....
Po 2 kronoj.

---

Kunven**ejo ("Esperantonia")** Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ Sinsenterrassen (tramo).

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper